

LINGVA KRITIKO

STUDOJ KAJ NOTOJ PRI GRAMATIKO, VORTARO KAJ STILO

Gvidanto: Prof. D-ro B. Migliorini, LK., Ak. Cefredaktoro; Stefano La Colla, LK. Redaktoroj: Max Butin, LK.; Teo Jung, LK.; Robert Kreuz, LK.; Ing. R. Orengo, LK. Redakcio: ĉe S-ro Stefano La Colla, Via Dandolo 24, Roma (114), Italujo

VOL. I * N-RO 27

ALDONO AL HEROLDO DE ESPERANTO

JANUARO 1935

Mitologia esploro pri la Esperanta vortaro.

De Prof. D-ro Penndorf.

Esperanto ja estas nepre moderna kreitaĵo, tamen ĝi bazas sur la tuta kultur-evoluo de la homaro, kiun iam treege influis la antikvaj grekoj kaj romanoj. Do ne estas mirige, ke en la Esperanta vortaro troviĝas ankaŭ multaj memorigaĵoj pri la antikva mitologio, kiuj bezonas klarigojn por modernaj ne-spertuloj.

Laŭ tradicio pratempe estiĝis kiel unua la haoso. La vorto origine signifas la oscedon, la larĝe malfermitan buŝon, la malplenan senfinan spacon, kiu fermentis kaj naskis malumon kaj nokton, plue eteron kaj tagon. Postuloj, precipe filozofoj, konsideris tiun haoson la kruda, neordigita maso, en kiu intermiksita kuŝis la ĝerموj de ĉio poste evolinta, la nura materio.

Restis en praa stato la Tartaro, malluma dezerta abismo, kie loĝadas la titanoj, la dekdu gefiloj de Cielo (Uranos) kaj Tero (Gaja), — grandegaj demonoj, terure fortaj, senleĝaj, obstinaj, malgraciaj, sovaĝaj naturfortoj, reprezentantoj de praa naturo. Sed alia pli kulturita, pli bonhumora dia generacio batale ilin superis kaj ĵetis ilin katenitaj en abismon. Unu el la titanoj estas Okeanos, la granda mondrivero, kiu daŭre ĉirkaŭfluas la terondon, la patro de ĉiuj riveroj kaj akvaroj sur- kaj subteraj. De lia nomo deriviĝas la internacia vorto oceano.

Titanido estas Prometeŭs, kiu laŭ la tradicio formis la unuajn homojn el argilo kaj akvo, donacis al ili la ĉielan fajron kaj pro tiu ŝtelo devis multe suferi. Frato de li estas Atlaso, prudenta grandegulo, kiu „scias la profundon de la tuta maro“. Sed ĉar li partoprenis la ribelon de la titanoj, Zeŭso, la ĉefdio, lin kondamnis porti ĉian la ĉielan volbon sur siaj ŝultroj, per kapo kaj fortaj manoj. Do li staris en malproksima okcidentlando ĉe la ekstrema rando de l' tero kaj eltenis nelacigite la ŝarĝon premegantan. Poste oni identigis lin kun la nordafrika monto Atlaso kaj rakontis, ke la heroo Perseŭs (helpe de la Meduza kapo) ŝanĝis lin en rokon, ĉar li ne gastigis lin afable. Nun en la arkitekturo oni nomas Atlantoj kurbajn homfigurojn skulptitajn, kiuj portante supraĵon anstataŭas kolonojn. Krome ni same titolas geografiajn kartaron, ĉar la holanda geografo Merkator (1512—1594) unua presigis sur la antaŭa folio Atlason portantan la ĉielglobon. Ankaŭ la Atlanta oceano havas sian nomon de tiu

mita persono, kaj la fabela insulo Atlantiso, menciita de la greka filozofo Plato (429—348 a. Kr.) kiel bela paradizo ideala, pri kies iama ekzistado oni ankoraŭ disputas. (Sed araban devenon havas la germana esprimo „Atlas“ por brila silka ŝtofo anstataŭ la franca „sateno“.)

Parencaj al la titanoj estas la gigantoj, grandegaj filoj de la terdino Gaja, monstroj kun skvamaj serpentaj piedoj, kun longaj hirtaj haroj kaj terura mieno. Ribelante kontraŭ la majestaj dioj, ili atakis la ĉielon per rokeroj kaj arbtrunkoj, amasigis monton super monto. Sed Zeŭso per siaj fulmoj kun la aliaj dioj kaj la heroo Herakles frakasis ilin kaj ĵetegis en la subteran regnon. Tiun mitan batalon vidigas grandiozaj reliefoj de la granda altaro Pergamon'a (nun en Berlina muzeo).

Post la venko Zeŭso, la plej juna filo de la titano Kronos (laŭ antikva interpreto, identa al la substantivo fronos-tempo, de kiu deriviĝas la internaciaj esprimoj: kroniko, kronologio, kronometro) kun siaj gefratoj, gefiloj kaj parenco ekposedis la estrecon super la mondo. Ili restadis preferi sur la monto Olimpo (en norda Grekujo), kies supron preskaŭ daŭre neĝo kovras kaj ofte nuboj ĉirkaŭvalas. Manĝaĵo kaj trinkaĵo de la dioj estas nomataj ambrozio kaj nektaro, kiuj konservas al ili senmortecon kaj ĉiaman junecon, kreas la specialan di-sangon. Ambrozio ĝenerale estas io ne nur bonodora kaj bongusta, sed ankaŭ majesta, dieca. Cio, kio venas de la dioj (ekz. nokto, dormo), ĉio, kio al ili apartenas (sango, vestaĵoj, armiloj, harbuko, ŝmiroleo, eĉ iliaj ĉevaloj kaj ties nutraro), de poetoj estas glorata kiel ambrozia. Ankoraŭ nun luksa festeno, abunda je ĉiaj bongustaj delikataĵoj, memorigas pri nektaro kaj ambrozio.

El la rondo de la Olimpaj dioj multaj pluvivas, kvankam plej ofte laŭ sia latina nomformo. Ekzemple la planedoj de nia sunsistemo nomiĝas Merkuro (patrono de la komerco), Venuso (diino de beleco kaj amo), Marso (militestro), Jupitero (dia reĝo), Saturno (protektanto de l' semado), Urano (Cielo), Neptuno (potenculo de maro kaj ĉia akvaro). La monato Januaro ricevis sian nomon de la speciale romana dio dukapa Janus, la Marto same de Marso. Vulkanon, la lama dio, kiu helpe de la fajro fondas metalojn kaj forĝas, havigis sian nomon al

erupciantaj montoj. Eroso, latine Amoro, filo de Venuso, bela ruza petolema knabo, nudkorpa, flugilhava, armita per arko kaj sagoj, pafas celtrafe la homojn en la koron kaj tiel ekscitas la reciprokan amon aŭ ŝerce turmentas. Sed la filozofo Plato idealigis la volupteman amon en spiritan sopiron al sciencia ekono. La artistoj oftete prezentis la junan Amoron kune kun lia amatino Psiĥe (origine: la homa animo, laŭ kiu titoliĝas la psikologio), poste ŝatis kunigi plurajn Amoretojn, kiuj sin okupas kaj amuzas tute laŭ homa maniero. Cetere la erotiko kaŭzis abundan ampezion.

Plue Iriso, la junaĝa ĉarma diino de la multkolora ĉielarko (la miriga ponto inter ĉielo kaj tero), do taŭga por transigi diajn ordonojn, traflugas la senfinan spacon „rapide, kiel neĝo falas el la nuboj aŭ la hajlo pelita de nordvento“. Nuntempe pri ŝi memorigas la irido, bela floro, kaj la iriso, kolora haŭto de l' okulo. — Ĉar Zeŭso origine estas dio de la ĉielo kaj iniciatanto de la naturaj fenomenoj, lin karakterizas la grizflava nubo, nomata aĝis, t. e. kapro-felo. Laŭ la mito li ja elfaris el la felo de la nutrinta kaprino Amaltheja ŝirmantan ŝildon kaj teruran batalilon por la milito kontraŭ titanoj kaj gigantoj. Kiam li, tronante sur montoj aŭ veturante tra la aero, skuas tiun timigan egidon, tiam ekestas ventego kaj malbona vetero; tiam li kolektas ĉirkaŭ si pezajn malhelajn nubojn, ĵetas fulmojn, aŭdigas tondron, tiel ke malproksimen la tero ektramas. Nur al sia preferata filino Pallas Athene la ĉefdio ofte pruntedonas la egidon; do la artistoj kutime karakterizas tiun diinon per skvama kiraso surbrusta. Ankoraŭ nun la vorto „egido“ esprimas ne nur grandan potencon, sed ankaŭ zorgeman protekton; la frazo „sub la egido“ estas egalsenca al „sub la ŝirmo, la gvidado“.

Ekzistas praantikva idolo de Pallas, skulptita el ligno, laŭdire defalinta el la ĉielo, konservita kiel talismano en la kastelo Troja; do grekaj herooj (Diomedes kaj Odysseŭs) devis ĝin forrabi, antaŭ ol la samnacionoj povis militakiri la fortikaĵon. Sekve ankaŭ nun paladio estas esprimo por sankta ŝirmilo, insigno, garantiaĵo, krome — nomo de ĥemia elemento.

Al la lumplena mondo kontraŭas la malluma subtera regno, kiun regas Hadeso, frato de Zeŭso, malserena kaj malgaja dio, kiun la homoj timas kaj malamas. Sed ĉar la tero enhavas ankaŭ altvalorajn metalojn, li estas riĉa posedanto, tial nomata ankaŭ Pluto (plutos = riĉaĵo; do plutokratio = stato, kiam estras la riĉuloj; cetere Pluto nomiĝas la naŭa, maljam en 1930 eltrovita planedo). Metafore la nomo hadeso celas la subteran regnon mem, la restadejon de l' animoj de la mortintoj, teruran lokon, gard-

atan de Cerbero, la trikapa hundo de l' infero. Antaŭ la pordego ĝi afable vostum ante salutas ĉiun alveninton, sed tuj ek-kaptas kaj engutas ĉiun, kiu volas returne iri el hadeso. Apatie, sen interesoj kaj sen konscio, tie vegetas la animoj, ĉar ili trinkis el la fonto Lethe forgeson de ĉia pasintajo, de la surteraj suferoj kaj ĝojoj. Do letargio estas dormemego, nepra indiferecenteco, daŭra senkonscieco. Cetere jam la grekoj konis specon de infero, kie la malpiuloj estas punegataj kaj turmentataj, kaj insulojn de la feliĉeguloj. La Elizeo, hejmloko de la pie foririntaj, t. e. mortintoj, estas ĉarma regiono en la ekstrema okcidentrando de la tero, kvazaŭ paradizo, kie ne estas neĝo nek vintra ventego nek pluvego, sed ĉiam printempa zefiro alblovas de la ĉirkaŭa oceano. Tie loĝas kaj plu vivas la karuloj de l' dioj senpene en feliĉego. De tiam „elizeaj kampoj“ havas la reputacion de ravega, ĝojiga, paradiza restadejo, por kviete ekzisti sen zorgoj kaj penoj. Fame konataj estas la „Champs Elysées“ en Parizo; „Elysée“ estas tiea palaco, loĝejo de l' prezidanto de la franca respubliko.

Pratemaj monstroj estas la ciklopoj, grandeguloj kun nur unu ronda okulo sur la meza frunto, gento preskaŭ sen kulturo, sen bonaj moroj, sen ŝtata ordo; ĉiu aparte loĝadis en kaverno, paŝtis sian brutaron. Ilia reprezentanto, la ciklopo Polifemo, avide manĝis ses kamaradojn de Odiseŭs kaj pro tio estis blindigata de la ruza heroo. Poste oni opiniis, ke li signifas la naturforton de fulmotondro. Sub la Etnamonto kaj aliaj vulkanoj ili, aŭdigante siajn gravegajn martelobatojn, forĝas la fulmojn por Zeŭso. Krome laŭ tiuj ciklopoj estas nomataj dikegaj muroj, devenaj el la dua jarmilo a. Kr., precipe en la suda Grekujo:

ĉar ŝajne homoj ne kapablis amasigi tiajn ŝtonblokojn.

Kontraŭas al la grandeguloj la pigmeoj = pugnuloj, t. e. homoj, grandaj nur pugno aŭ ulnon, laŭ Homero fabela gento da malgrandeguloj, loĝantaj ĉe la bordoj de la suda oceano, kontraŭ kiujn aŭtune ekmilitiras la grupoj suden migrantaj. Poste oni ilin lokis ĉe la fontoj de la Nil-riverego kaj konjektis, ke tiu batalo simbole aludas la supren- kaj malsupreniĝon de la akvonivelo. Sekve kelkaj modernuloj konsideras la pigmeojn ne kreaĵo de la greka fantazio, sed memoro, kvankam neklara, pri la ekzisto de mezafrika popolo da malgrandaj homoj. La arto volonte kontrastigis la pigmeojn al grandega Herakleso: la etuloj grimpas ĉe kaj sur la dormanta heroo, ne povante lin malutili. Ridante li kolektis aron da ili en sia leona felo kaj ĝin portis al sia reĝo: la fabelo memorigas pri „Gulliver ĉe la iliputoj“.

Demono, laŭ la greka opiniaro, origine ne iom diferencas de dio; sed poste la filozofoj difinis ilin estaĵoj mezaj inter la dioj kaj la herooj. Sekve oni supozis bonajn kaj malbonajn demonojn, bonvolajn patronojn, venĝemajn fantomojn, turmentajn koboldojn, kiuj ĉiel influas la homan sorton. Sed maljam la judoj kaj la kristanoj juĝis ĉiujn diojn de l' idoloj kiel malicajn demonojn aŭ diablojn. Ĉi tiu grekdevena vorto origine signifas malpacigan, kalumnieman personon. Kiel la grekoj al ĉiu homo de post la naskiĝo atribuis specialan dumvivan demonon, tiel laŭ la kredo de italoj ĉiu viro enhavas sian diulon aŭ genion kvazaŭ alian mion. Do la datreveno de la naskiĝo estis festtago por la genio, al kiu oni oferdonis kukon, vinon, florojn ktp.

Cetere ekzistas en la greka mitologio sufiĉe multaj monstroj timigaj. (Daŭrigota.)

W. E. Collinson:

La strukturo de Esperanto kompare kun tiu de nordeŭropaj lingvoj.

Prelego farita okaze de la 26-a Universala Esperanto-Kongreso en Stokholmo.

(Daŭrigo.)

Transirante al la verbo-derivaĵoj, ni konstata unue interesan trajton en Esperanto, kiun s-ro Waringhien diskutas en sia verko *L'Espéranto et la Stylistique* (Rodez, 1931), nome la uzo de la prefikso *pri-* por transktivigi la simplan verbon kaj ŝanĝi la rilatojn inter la personoj aŭ objektoj celataj de la verba ago, ekz. *rabi ion de iu / pri rabi ion*. Ni trovas traŭn paralelon en la skandinava lingvoj, kiuj uzas la prefikson *be-* transprenitan dum la Hansa epoko el la germana, ekz. *tenke/betenke* por *pensi/pripensi*, *lyse/belyse* por *lumi/prilumi*, *skrive/beskrive* por *skribi/priskribi*. Mi ne dubas, ke Zamenhof alprenis ĉi tiun utilan rimedon el la germana kaj, kiel ofte, ĝeneraligis la uzadon.

Alia franco, s-ro Camille Aymonnier, primiris kaj admiris en sia bone konata *Essai sur la dérivation comparée dans les langues naturelles et artificielles* (Parizo, 1921) la derivilojn por formi novajn verbojn. Li registras tutan serion da derivaĵoj el iri, ekz. *aliri*, *disiri*, *foriri*, *kuniri* ktp. kaj poste atentigas pri la „parasyntétiques verbaux“ kiaj *en-tomb-ig-i*, *sen-ŝel-ig-i*, *el-ter-ig-i* ktp.

Ambaŭ estas tre kutimaj procedoj en la germanaj lingvoj, ekz. *glennemgä*, *sønder-*

rive, *innsproite* aŭ *avbarke*, *avskove*, *avskumme*, germ. *beerdigen*; ili ankaŭ troviĝas en la franca, ekz. *déboiser*, *enterrer*, *emmagasiner* ktp., sed ne tiel ofte kaj sisteme kiel en Esperanto kaj la nordaj lingvoj.

Post la vortfarado kelkaj rimarkigoj pri la fleksia sistemo!

La akuzativo, kiu estas samtempe la kazo de direkto kaj pli malpli egalvaloras al sagpinta simbolo reprezentanta la direkton de logika rilato, foriĝis de la nordgermanaj lingvoj escepte ĉe la pronomo. Ĝi ankoraŭ vivas en la maskulina substantivo en la germana, kaj ĝi restas netuŝita ankaŭ en la slavaj lingvoj kaj en la finna. En ĉiuj lingvoj ĵus cititaj kaj en la latina kaj greka la akuzativo povas stari responde al demando „kiom da tempo?“ aŭ „kiom da distanco?“ En Esperanto oni eĉ uzas senprepozicie la akuzativon post verbo de movado, ekz. *mi iras Londonon*, *mi iras Svedlandon*, sed laŭ mia sperto nur kun propra nomo. En la finna troviĝas por tia celdirekta funkcio la „illativa“ kazo en *-n*, vere rimarkinda koincido, kaj oni diras *menen Helsinkin*, *menen Ruotsiin*. Tamen,

kontraŭe al la Esperanta kutimo, oni uzas saman kazon ankaŭ ĉe nepropraj substantivoj kaj diras *menen kouluun*, *kirkkoon* ktp., kvazaŭ oni dirus en Esperanto „*mi iras lernejon*, *preĝejon*“ ktp. Verŝajne Zamenhof ĉerpis la konstruon el la latina akuzativo kun alloka funkcio, ekz. *eo Romam*, „*mi iras Romon*“, sed ankaŭ la latina povas diri *eo rus*, „*mi iras al la kamparo*“, laŭvorte „*mi iras kamparon*“.

Venante al la genitivaj funkcioj, oni konstata, ke rimarkinda fenomeno en Esperanto estas la distingo inter de priskribanta kaj da mezuranta, kontraŭ ke la franca prepozicio de servas por ambaŭ, ekz. *le président de la République* kaj *une bouteille de bière*. Kio supozeble instigis Zamenhof enkonduki apartan prepozicion por indiki la objekton kvantigatan, t. e. kalkulatan aŭ mezuratan? Eĉ la rusa uzas saman kazon kaj por la posedo kaj la kvalito. Mi opinias, ke la germana sugestis la modelon per diferencigo inter *die Tiefe des Wassers* kaj *ein Glas Wasser* (kun nominativo). Tia distingo karakterizas krome la skandinava lingvojn, ekz. en flaske vin, sv. *ett glas vatten*. La finna distingas en tiaj okazoj la partitivan for de la genitivo kaj diras ekz. *kilo kahvia*, „kilogramo da kafo“, *paljo paperia*, „multe da papero“. Se oni atentigas al la kvalito de la regata substantivo pli ol al ĝia kvanto, la germana uzas aŭ la genitivan aŭ *von* kaj la skandinava lingvoj uzas la prepozicion *av*, ekz. *et glas av den beste vin*, *et glas av denne vin*; ankaŭ la finna distingas tiuokaze inter la partitivo, ekz. *palanen juustoa*, „peco da fromaĝo“ kaj la elativo (la el-kazo) *palanen juustosta*, „peco de la fromaĝo“.

Tre rekomendinda en la pronoma sistemo estas la distingo starigita de Zamenhof inter pronomo rilatanta al subjekto de frazo kaj pronomo rilatanta al iu aŭ io alia; mi volas diri la diferencon inter li vidis sian patron kaj li vidis lian patron. Kontraŭe al la germana, la franca kaj la angla lingvoj la nordaj lingvoj kiel ankaŭ la latina havas apartajn vortojn, ekz. *han sã sin far* (lat. *suus*) / *han sã hans far* (lat. *ejus*).

Estas interese rimarki, ke la norda sintute kiel la Esperanta ŝia ne povas stari apud la subjekto, ĝi povas nur rilati malantaŭen al ĝi, kaj oni ĉiam devas diri *hans far gik ut*. La finna ankaŭ distingas subjektrilatantan kaj subjektsanĝantan posedvortojn; la sufikso *-ensa* starante sola esprimas *sia*, kaj oni ricevas la signifon *lia* aŭ *sia* per enmeto de la vorto *hänen* antaŭ la substantivo sufiksa, ekz. *kirja libro*, *kirjansa*, „*sia libro*“, *hänen kirjansa*, „*lia libro*“.

Por montri ekstreman gradon de ĝeneraleco, de senlima elekto inter ĉiuj alternativoj, Zamenhof uzas la vorteton *ajn*, ekz. *iu*, *io ajn*; *kiu*, *kio ajn*; *ĉiu*, *ĉio ajn* ktp. Mi ne scias, ĉu la angla any estas la fontvorto; ĝi certe respondas al *iu ajn*, „any one“, *io ajn*, „anything“, sed post demando aŭ relativa pronomo ni diras „ever“, ekz. *whoever*, *whatever*. Sed la nordlingvoj havas konstruon tre similan al tiu de Esperanto post *kiu*, *kio*, ekz. *norvega enn*, *sveda än* en *hvem der enn kommer*, „*kiu ajn venas*“, *hvad der enn skjer*, „*kio ajn okazas*“.

Alia rimarkinda paralelo inter Esperanto kaj la nordlingvoj estas la indiko de proporcio variado asertata kiel validanta inter du faktoj, ekz. *ju pli rapide mi parolas*, *des pli malfacile vi komprenas*. Kvankam Za-

menhof verŝajne adaptis la germanan vortaron je—desto, ŝanĝante je en ju pro tio, ke li estis preninta je kiel universalan prepozicion, fakte estas, ke ni trovas akurate en la sveda la formojn ju kaj des kun la sama funkcio.

Alia partiklo akordiĝas pli kun la finna, nome la demanda vorteto *ču*, kiu fakte devenas de la pola lingvo. Logike oni ofte distingas du specojn de demandoj: demandoj por decido per *jes/ne*; demandoj por determino (responda en Esperanto al la ki-korelativoj). Por la unua speco la finna havas specifan demandvorteton *-ko* (*-kö*), kiu alĝuiĝas al la vorto, pri kiu estas decidende, ekz. *voitteko* „ĉu vi povas?“, *niinko* „ĉu tiel?“, *puhutteko* „ĉu vi paroŝas?“ ktp. Estas ankaŭ rimarkinde konstati, ke la finna montras kelkajn paralelojn al Esperanto en la korelativa tabelo, ĉar la demandaj terminiloj ofte havas *k*-kiel komencan sonon, ekz. *kuka* „kui“, *kutka* „kuij“ (oni rimarku, ke ankaŭ la finna havas pluralan formon kontraŭe al la angla, germana kaj skandinavaj lingvoj), *kenen* „kies“; la demonstrativoj havas *t*-, ekz. *tuo* „tia“, *tämä* „tiu ĉi“, kaj kelkaj nedifinitoj havas *j*-, ekz. *joĵu* „ju“.

La verbo en Esperanto estas tre nuancoriĉa. Ĝi ampleksas ne nur tempoformojn en *-as*, *-is*, *-os* kaj modojn en *-us*, *-u*, sed krome povas montri diversajn „aspektojn“. „Aspekto“ estas la procedmaniero de verba agado konsiderata laŭ la vidpunkto de ĝia memkompleteco kaj difiniteco. La slavaj lingvistoj distingas du bazajn aspektojn, nome la „perfektiva“, laŭ kiu oni konstatas la simplan plenumon de ago sendepende de ĝia daŭro) kaj la „neperfektiva“ (kiu indikas la evoluadon de la ago daŭranta). La per-

fektiva verbo povas esti simple daŭroneŭtrala, ekz. li skribas bone aŭ li skribis leteron hieraŭ, aŭ ĝi povas eksplicite atentigi al la punkto de komenciĝo, ekz. ekskribi, aŭ al la punkto de finiĝo, ekz. elskribi, finskribi. „Neperfektiveco“ esprimiĝas en Esperanto aŭ per *-ad*, ekz. skribadi, aŭ per la tempoformoj kunmetitaj kun partecipo en *-ant*-, ekz. mi estas skribanta, estis skribanta, estos skribanta, kiuj ĉiuj implicas la daŭron. La fenomeno de la „aspektoj“ estis bone konata de Zamenhof el lia kono de slavaj lingvoj; la esprimon de daŭro per *esti*, kaj vorto iom analoga al partecipo prezensa li povis trovi en la angla *I am writing*, la hispana *esto escribiendo* kaj en la keltaj lingvoj. En la germana la Rejnlandanoj familiare uzas specifan konstruon por indiki la „neperfektivecon“, ekz. por mi estas/estis leganta oni ofte diras *ich bin/war am Lesen*, kelkfoje eĉ kun celvorto *ich bin ein Euch am Lesen*. Generale oni ne sentas la neceson akcentigi la daŭron aŭ nefinitecon aŭ oni esprimas tion — kiel Jacobsohn trafe demonstros en artiklo „Aspektfragen“ aperinta en *Indogermanische Forschungen* LI — per elekto de prepozicio, ekz. *ich schrieb drei Stunden lang an dem Brief, ich las in dem Buch*. La nordlingvoj havas similajn konstruojn kaj krome povas „neperfektivigi“ la verbon per kunordigo kun alia, ekz. norv. *han ligger og sover, jeg står og venter, de sitter og spiser*. Oni ankaŭ povas uzi holde på, ekz. *han holder på å klæ sig aŭ være ved at*, ekz. *solen der var ved at gå til hvil* „suno kiu estis subiranta“. Por „mi estas leganta“ la finna uzas la inessivon de la deklinata infinitivo, ekz. *olen lukemassa* „mi estas enlegado“, *olin uimassa* „mi estis naĝanta ktp. (Finca.)

Kvankam plejofte la signifo de la antaŭnomoj ne plu estas klare perceptata, tamen kelkaj el ili restas kompreneblaj. Nomoj kiel *Inocento*, *Leono* aŭ *Klara* estas ankoraŭ nun komprenataj en latinidaj landoj aŭ de latinkonantoj. Elektante por infanoj tiajn nomojn, oni sekvas la saman vojon, kiun malfermis tiuj, kiuj kreis la nomojn. Kiom da infanoj oni baptis *Viktoria* aŭ *Paco* ĉe la fino de la mondmilito!

Aludojn al la signifo de antaŭnomoj aŭ familiaj nomoj oni trovas sennombre, en la literaturo kaj en la vivo. Dante aludadas pri la signifo de la nomo de sia amatino, *Beatrice*, t. e. „tiu kiu igas beata“. Molière, en sia fama *Tartuffe*, ŝercas pri la nomo de iu sinjoro *Loyal*, dirante ke la aspekto estas, kontraŭe, tre maljola. Kaj Beethoven, parolante pri Bach, kies nomo signifas „rivereto“, diras ke li ne devus nomiĝi „rivereto“, sed „maro“: *Nicht Bach, Meer sollte er heißen!* Kaj kiu stranga hazardo antaŭdestinis la fratojn *Lumière* (t. e. france, „lumo“) esti la inventantoj de la kinematografo kaj de la kolorfotografado?

Oni rakontas kuriozajn anekdotojn pri nomo havanta signifon en la komuna lingvo. En Budapeŝto, posttagmeze antaŭ iu teatro, troviĝas granda popolamaso, tie kunveninta por aŭdi la grandan komponiston Liszt. Muelisto, pasante tra la strato, vidas tiun amason, kaj demandas, pri kio temas. Oni respondas: *Liszt*. Sed en hungara lingvo, *liszt* signifas „farunon“, kaj nia brava muelisto pensis, ke, se tiom da personoj kunvenis por serĉi farunon, eble li povos favore negoci. Tial, la sekvantan tagon, li venas kun ĉaro plenplena da faruno, kaj haltas antaŭ la teatro, kriante per sia plej alloga voĉo: *liszt, liszt!*

Aliaj fojn, homonimio savis reĝan vivon. La 16-an de aprilo 1846 iu Lecomte pretiĝis atenci per pafilo kontraŭ la franca reĝo Louis-Philippe. Gardosoldato vidis la homon kaj kriis al la grafo de Montalivet, kiu sidis apud la reĝo: *Ha! sinjoro grafo! (Ah, Monsieur le comte!)*. La murdisto, aŭdante la vorton *le comte*, kredis, ke oni rekonis lin; li malaltigis la armilon kaj forkuris: la dusencaĵo estis savinta la vivon de la reĝo

Sed ni revenu al nia ĉefa temo. Ni vidis, laŭ kiaj motivoj, religiaj, tradiciaj, politikaj, literaturaj, aludaj oni elektas nomojn el la ricevita nomprovizo. La kreado de novaj nomoj estas, ni jam insistis pri tio, en nia tempo tre malvigla, kaj eĉ malpermesata, almenaŭ teorie, en kelkaj landoj: ekzemple en Francujo, leĝo de 1803, neniam nuligita, malpermesas elekti nomon ekster la kalendaraj listoj kaj la nomoj de la antikva historio. Tiu leĝo estis reakcio kontraŭ la trezo de strangaj nomoj, aperintaj dek jarojn antaŭe, dum la plej revoluciaj jaroj. Tiam, la infanoj ricevis ne nur nomojn de revoluciestroj, kiel *Marat*, *Robespierre*, ne nur abstraktajn nomojn kiel *Unueco*, *Fidel-eco*, sed nomojn kiel *Pomo*, *Ciklameno*; kaj posedanto de modesta trinkejo donis al sia filo la esperplanan nomon de *Kafejo-Bilardo*

Similajn fenomenojn oni konstatas nun en Sovetio, kie la nomoj *Federacio*, *Marsej-lezo*, *Ideo*, ktp. estas oftaj.

Iom pli stranga estas tio, kio okazis en Rusujo en 1825. Ĉe la morto de la caro Aleksandro I, la heredonto estis lia frato Konstantino; sed tiu ĉi rifuzis, kaj la krono estis pasanta al alia frato, Nikolao. Tamen Nikolao estis konsiderata tre reakcia, kaj laŭ liberalaj instigoj kelkaj regimentoj ribe-

Br. Migliorini:

La personaj nomoj.

Prelego farita okaze de la 26 Universala Esp.-Kongreso en Stokholmo.

(Fino.)

Naciajn sentojn oni ofte esprimas donante al la infanoj nomojn elektitajn en la nacia historio. En la reĝolandoj oni tre ofte elektas la nomon de la reĝoj aŭ de ilia familio (*Viktoro*, *Humberto* en Italujo, *Georgo* en Granda Britujo, *Gustavo* en Svedujo; tio klarigas oftecon de nomoj kiel *Francisko Jozefo*, *Maksimiliano*, *Leopoldo* en Aŭstrio ktp. La admiro kelkfoje etendiĝas ankaŭ ekster la landlimoj, pro politikaj motivoj unue, simple pro modo pli malfrue. La sveda nomo *Gustavo* larĝe etendiĝis pro la famo de *Gustavo Adolfo*, „la leono de la Nordo“, unue en la protestantaj landojn, poste pro ekzotismo en la ceteran Eŭropon.

La nomo *Napoleono* sekvis la oscilantan famon de la granda Korsikano. Tiu nomo, tradicia dum la Mezepoko en kelkaj nobelaj italaj familioj, ekz. la familio *Orsini*, daŭris en la nomdonado de la familio *Bonaparte* kiam ĝi transloĝiĝis de Itala Duoninsulo al Korsiko; sed ĝi aspektis tute nekonata kaj stranga, kiam la politika prospero de ĝia portinto ĝin tiel altigis. Ne multaj kuraĝis ĝin porti eĉ en la landoj dependantaj de *Napoleono* mem; poste, kiam li falis, oni eĉ punis en Francujo oficiston, kiu toleris, ke oni donu tiel danĝeran nomon al infano. Kaj eĉ la nomo de sankta *Napoleono*, kiun dum kelkaj jaroj oni trovis en la kalendaro sub la dato de la 15-a de aŭgusto, malaperis pro

la zorgoj de la Sankta Alianco. Kompreneble la nomon oni ree uzis sub *Napoleono 3-a*.

Kvankam en pluraj landoj la leĝoj tion malpermesas, ĉu laŭ formala, ĉu laŭ politika vidpunkto, oni ofte esprimis sian admiron al militaj aŭ politikaj gvidantoj donante ilian familian nomon kiel antaŭnomon al infanoj: ekz. la nomon *Garibaldi* oni kelkfoje uzis ne nur en Italujo, sed ankaŭ, ĉirkaŭ 1848, en Germanujo, dum kompreneble en aliaj landoj ĝi estis konsiderata revolucie danĝera.

Alia motivo, tre grava en diversaj periodoj, estas la literatura. Kiam, dum la 12-a kaj 13-a jarcentoj, disvastiĝis en la tutan Eŭropon la kono de la nordfranca literaturo, la nomoj de la herooj de la *Karolida* epopeo kaj de la kavaliroj de la *Ronda Tablo* paralele diskoniĝis: en Italujo la *Rolandoj* kaj la *Arturoj* fariĝas sennombraj. En la 18-a kaj eĉ pli en la 19-a jarcento la famo de romanoj kaj pluraj operoj bone speguligis en la nomdonado: la angla diminutivo de *Francisca*, t. e. *Fanny*, populariĝas sur la kontinento dank' al iu romano de *Fielding*, *Emile* kaj *Julie* ŝuldas multon de sia prospero al *Jean-Jacques Rousseau*, *Elsa* fulme disvastiĝas post la unua prezentado de *Wagner'a Lohengrin* en 1850. *Wolfgang* estas nomo larĝe uzata en Germanujo pro aludo al *Goethe*; same kiel *Dante* aŭ *Laura* en Italujo, memore de *Dante* kaj de *Petrarca*.

lis, je la krio: „Vivu Konstantino! Vivu Konstitucio!“ Oni sciis pli poste, ke la soldatoj, aklamante Konstitucion, kredis aklami la edzinon de Konstantino.

En la landoj, en kiuj ne regas tiel severa nomlimigo kiel en Francujo, la kreado de novaj nomoj estas sufiĉe granda; kaj ĉiu eĉ malgranda popola entuziasmo trovas sian eĥon en la nomaro. Kiam, antaŭ kelkaj jaroj, en Usono kelkaj ŝtatoj malpermesis instrui la evoluciistajn teoriojn, patro, kiu evidente havis specialan intereson pri tiu debato, donis al siaj dunaskitoj la nomojn **Evo kaj Lucio (Evo — Lution)**. Pasis la limojn de la strangeco ankaŭ la nomo de **Belzebuo**, kiun usona pastro donis al sia filo, Strange por pastro, ĉu ne? sed li estis decidinta, ke li malfermos hazarde la Bibliion, kaj ke li donos al sia filo la unuan propran nomon, kiun li renkontos... malfavora hazardo volis, ke tiu nomo estu Belzebuo. Sed tiuj ĉi estas esceptoj. Ĝenerale, kvankam la nuna nomdonado estas malpli libera kaj pli burokrata, malpli poezia kaj pli racia ol la antikva, oni tamen ankoraŭ per ĝi povas esprimi sentojn kaj aspiracion.

Ŝanĝiĝas la tempoj, ŝanĝiĝas la moroj; tamen la lingvo konservas, ĉu en la komuna vortaro, ĉu en la propraj nomoj, postvivajn de la antaŭaj kondiĉoj; kaj malgraŭ ĉiuj ŝanĝoj eĉ kelkaj el la plej elementaj tendencoj daŭras.

Ce la aztekoj de la antikva Ameriko oni kutimis doni nomojn de bestoj al la infanoj, nomojn de floroj al la infaninoj. Se ni studas la nomojn ne nur de la antikvaj popoloj, sed ankaŭ de la nunaj, ni trovas, ke sufiĉe alta nombro devenas ĉu de bestnomoj, ĉu de flornomoj. Ni trarigardu ilin iomete.

En la antikva fazo de ĉiuj hindoeŭropaj lingvoj ni trovas multe da ili. Jen ekz. sanskritaj nomoj kiel **Vrŝan**, t. e. „bovoviro“, **Vrkājina**, t. e. „felo de lupo“, **Šakuna**, t. e. „birdo“; eĉ la konata nomo de la dramheroino **Šakuntala** estas birdonomo. En antikva Persujo ni trovas nomojn signifantaj **Hundo**, **Falko**, **Turturo**. La reĝo **Ciro** estas nutrita, laŭ la legendo, de meda virino kun nomo **Spakô**, t. e. „hundino“; kio memorigas la legendon pri la Romaj ĝemeloj, **Romulus** kaj **Remus**, nutritaj de lupino aŭ de virino kun nomo **Lupa**. Ce la grekoj ni trovas la nomojn **Leon**, t. e. „leono“, **Lykos**, t. e. „lupo“, **Alopex**, t. e. „vulpo“, **Moschion** t. e. „bovido“, **Korax**, t. e. „korvo“. Eble la nomo mem de la Homera heroo **Aiax** signifas „aglo“. Sed ankaŭ de malgrandaj bestoj, de la rano aŭ de la formiko, oni prenis nomojn: la nomo de la fama korteganino **Phryne**, la amantino de **Praxiteles**, senkulpigita en proceso pro ŝia nura beleco, eble signifas iom senpoezie „rano“, kaj la alia virina nomo **Lalage**, fama ĉe grekaj kaj latinaj poetoj, signifas ankaŭ ian specon de rano. La nomo **Melitta**, **Melissa** signifas „abelo“.

La plej ofta bestnomo en la greka nomaro estas tiu de la ĉevalo, kiun ni trovas en sennombraj kunmetitaj nomoj: ni citu nur **Fillpon** „la amiko de la ĉevaloj“, **Hipoliton** „la solvanto de la ĉevaloj“ kaj **Hipokraton** „la kvietiganto de la ĉevaloj“. Ankaŭ la nomoj enhavantaj memoron de la lupo aŭ de la leono estas sufiĉe oftaj: **Likomedo** kaj **Likurgo** aludas al lupo, **Pantaleono** kaj **Timoleono** al la reĝo de la bestoj.

Pantaleono, „plene leono“, solene bela nomo. Sed longan vojon ĝi havis post si. Ĝin portis kristana kuracisto, martiro

en **Nikomedio** en 305, kaj kun la kulto de tiu sanktulo la nomo disvastiĝis en la Orienta Imperio. Oni rakontas pri la disputoj de du fratoj, unu kun nomo **Leono**, kaj la dua kun nomo **Pantaleono**, kiuj ĉe la morto de sia patro procesis pro lia testamento. Li estis skribinta, ke li lasas **pantaléontii**, sed laŭ tio, ke oni legas tiun grekan esprimon en unu vorto aŭ en du vortoj, ĝi signifas ke li testamentas ĉion al **Leono**, aŭ ke li testamentas al **Pantaleono**. La historio ne rakontas, kion la juĝistoj decidis.

Pro la rilatoj inter Konstantinopolo kaj Venecio, ankaŭ en tiu ĉi urbo la sanktulo estis tre honorata, kaj la nomo fariĝis iam tre ofta: tiel ofta, ke oni indikis per la nomo **Pantalone** la maskon prezentantan Venecian maljunulon, kun blanka barbo kaj longaj ruĝaj krurovestoj, kiujn oni nomis, laŭ tiu masko, **pantalonej**. La modo disvastiĝis dum la Franca Revolucio, opozicie al la aristokrataj mallongaj krurovestoj. Jen tra kiu longa vojo en la nomo de la ĉiutagaj pantalonej kaŝiĝas la nomo de la leono.

Cetera la nomo **Leono** ne estas nur trovbla ĉe la grekoj: ni trovas ĝin en oriento ekz. ĉe la armenoj, okcidente ĉe la romanoj: dektri papoj portis tiun nomon, komencante de tiu, kiu rezistis kontraŭ **Attila**. En kelkaj landoj, ĝi estas nun pli ofta inter judoj ol inter kristanoj. Igis ĝin ofta la fama biblia komparo de Juda kun juna leono (I. Mos. 49.9); ankaŭ alia kaŭzo kontribuis al tio: la ŝanĝo de la nomo **Levi**, en germanlingvaj landoj, al **Löwe** aŭ **Löw**, t. e. „leono“.

Daŭrigante nian vojaĝon por serĉi personajn nomojn devenantajn de bestnomoj en aliaj landoj ni trovas ilin grandnombre ĉe la antikvaj romanoj: la genta nomo de la du grandaj Katonoj estis **Porcius**, derivaĵo de **porcus**, t. e. „porko“; kaj la fama poeto **Catullus** havas nomon, kiu signifas „hundeto“, kaj lia ne malpli fama kolego **Ovidius** montras en sia genta nomo derivaĵon de **ovis**, t. e. „ŝafo“. Ĉefe en la tria elemento de la roma nomsistemo, en la „cognomen“, ni trovas ofte bestnomojn, ekz. **Capra** aŭ **Capella**, t. e. „kaprino“ aŭ „kaprino“, **Merula** t. e. „merlo“, **Musca**, t. e. „muŝo“, **Vacca** t. e. „bovino“, **Vespa** t. e. „vespo“, ktp. La nomo de la malbonfama venenantino **Locusta** signifas „akrido“.

Antaŭ dum la kristana epoko, tiu metodo daŭris: ni trovas ekz. inter la nomoj de la sanktuloj la nomojn **Lupus**, **Ursus** kaj **Aper**, t. e. „lupo“, „urso“ kaj „apro“, krom la jam citita nomo **Leono**. La patrino de la papo **Johano VII** havis la nomon **Blatta**, t. e. „blato“. Dum mezepokaj jarcentoj, oni donis en Pirenea regiono **Béarn** la nomon **Lupo** al eksterleĝaj infanoj.

En la Verona princa familio **Della Scala**, kelkaj portis la nomon **Cane**, t. e. „hundo“ aliaj eĉ la nomon **Mastino**, t. e. „kortohundo“: oni supozis, ke ĝi estas la orienta titolo **fiano** (la fiano de la tartaroj, ktp.) transformita en bestnomon; sed aliaj kredas, ke ĝi estas moderna traduko de la jam citita nomo **Catullus**, pro la famo, kiun la poeto ĉiam ĝuis en sia patrolando **Verono**.

Ni devas flanklasi, pro ilia tro granda nombro, la familiajn nomojn devenantajn de bestnomoj en la latinaj lingvoj: nur du ni citos, tiun de la granda esploristo, kiu gajnis al la civilizacio novan kontinenton kaj al si mem la karceron, la **Genovano Colombo**, kaj tiun de la fama franca tragediisto **Corneille**: france **corneille** signifas „korniko“.

Ĉe la teŭtonidaj popoloj, la nomoj devenantaj de bestnomoj estas ankaŭ tre oftaj. La dio **Thor** havis ĉiam kun si la urson kaj kelkaj familioj konsideris tiun beston kiel totemon, t. e. kiel prapatron kaj protektanton. Tio klarigas la nomojn **Behrend (Berndt, Behrens)**, **Bernhard** de germana lingvo, **Björn** de skandinavaj (**Björnson** estas do la „filo de la urso“: oni povus ĝin traduki per la itala familia nomo **Orsini**).

La dio **Odino** havis kun si du lupojn **Geri** kaj **Freki**, kiel hundojn, kaj du korvojn **Huginn** kaj **Muninn**, sur siaj ŝultroj: pro tio oni trovas tre ofte en personaj nomoj aludojn al lupo kaj al korvo. La nomo de la apostolo de la gotoj, la tradukinto de la Biblio en gotan lingvon estas **Wulfila** aŭ **Ulfila**, t. e. „lupeto“. **Wolfgang** enhavas la nomon de la lupo, en sia unua elemento, **Rudolf**, **Adolf** ktp. en sia dua: **Wolfgang** signifas do „marŝo de lupo“, **Rudolf** „fama lupo“, **Adolf** „nobla lupo“. La nomon de la korvo ni trovas ekz. aplikita al fama episkopo kaj scienculo de la IX-a jarcento, **Hrabano Mauro**, kaj en kunmetaĵoj kiel **Bertram** „la brilanta korvo“. La nomo **Wolfram** kunigas ambaŭ bestfetiĉojn: la lupon kaj la korvon.

Ankaŭ leonoj kaj agloj aperas en la teŭtonida nomaro: ekz. en la nomoj **Leonhard** „forta kiel leono“, **Arnold** „estranta kiel aglo“.

Sed jam sufiĉos la cititaj ekzemploj por hindoeŭropaj lingvoj. En la semidaj, ni denove trovas bestaludojn, ekz. en la hebreaj nomoj **Jonah** „kolombo“, aŭ **Rachel** „ŝafo“, aŭ **Deborah** „abelo“.

Iom malpli oftaj ol la nomoj prenitaj de la besta regno, sed tamen sufiĉe multnombraj estas tiuj, preskaŭ nur, kompreneble, virinaj, prenitaj de floroj aŭ de kreskaĵoj. Aludojn al la lotuso kaj al la santalo estas oftaj en la hindaj nomoj, ĉe la grekoj ni trovas nomojn signifantajn „akanto“, „vin-arbo“, „hedero“, „papavo“, kaj eĉ „celerio“; oftaj estas la nomoj signifantaj „mirto“: **Myrrhine**, **Myrto**, **Myrte**. Ĉe la romanoj, ni trovas tre ofte la nomon **Flora**, aldan al la diino de la floroj; ekzistis ankaŭ la nomo **Viola**, t. e. „violo“. Dum mezepoko estis fama la legendo pri la du junaj gemantoj **Florio** kaj **Blankafloro**. Tre ofta en pluraj modernaj lingvoj estas la nomo **Rozo**, sufiĉe oftaj ankaŭ la nomoj devenantaj de la lilio, ĉefe la slavdevena **Liliana** kaj la hispana **Azucena**.

Tiu hispana nomo devenas, kiel multaj vortoj el tiu lingvo indikantaj kreskaĵojn, el araba radiko: la sama, kiun ni retrovas en virina nomo de alia semida lingvo por indiki same lilion: pensu al la biblia **Susanna**.

Alia fiornomo konata en pluraj lingvoj estas la margareto: itale **Margherita**, france **Marguerite**, germane **Margarete** aŭ, en la formo, kiun **Goethe** igis fama en la tuta mondo, **Gretchen**, angle **Daisy** ktp. En Francujo oni ankaŭ trovas, malgraŭ la severeco de la leĝo, **Primevère**, **Muguette**, t. e. „konvaŭlo“, **Bluette**, **Eglantine**. Ĉi tie ni povas citi ankaŭ pure Esperantan ekzemplon: en 1912 franca esperantisto el **Chaton (Seine)** donis al sia filino la nomojn **Feino Floreto**.

Ni estas ĉe la fino de nia promenado. Mi montris al vi, kiel en la propraj nomoj speguliĝas ideoj, aspiroj, tendencoj de la homoj. La historia analizo montras ankoraŭ en ili fajron de la fajro, kiu ilin naskis, montras en ili unu el la plej simplaj monumentoj de la amo.